

**Prelego kiel ferma akto de la unua kurso de Esperanto en la Universitato de Oviedo**

La esperantista festo de la jaro 2006 okazis la 17an de decembro. Tiu jare organizis ĝin nia **AEA**, sed tamen ĝi ne okazis en Gijón kiel kutime ĉe ni, sed en Candás. Unue estis meso en Esperanto en la preĝejo de tiu urbo kaj poste la geesperantistoj de la du asturaj E-grupoj bankedis en restoracio.

La kurso de Esperanto de la lernojaro 2006-2007 estis komencita de Santiago Mulas, sed li povis gvidi la klasojn nur dum la unua trimonato, ĝis la ferieto de Kristnasko-tempo. En unu el tiuj feriotagoj li suferis gravan akcidenton kiu devigis lin ripozi por kuracado dumlonge. La klasoj de la cetero de la kurso estis gviditaj de Carlos E. Carleos kaj Faustino Castaño.

Fine de monato aprilo de 2007, Aida Álvarez, ĵurnalistino de "El Comercio", faris intervjuon en la ejo de nia Asocio. Ĉeestis ĝin la gelernantoj kaj la instruistoj de la lerno-kurso. La demandoj temis pri la historio de Esperanto kaj nia Asocio, pri la trajtoj de la lingvo (ĉefe ĝia lernofacilo), k.t.p. Oni publikigis la intervjuon la trian de majo de 2007.

Malmultajn semajnojn post tiu intervjuo de "El Comercio" (la dudekkvaran de majo) telefonis ĵurnalisto de **TPA** (Televido de la Asturia Princlando) telefonis al la Prezidanto de nia Asocio, Carlos E. Carleos, por fari raporton pri la Asocio. La rendevuo okazis en Oviedo, en la Universitata Kampuso Llamaquique, kie tiujare estis disvolviĝata Esperantokurso. La demandoj estis pri Esperanto, nia Asocio…

Ĉar nia **Astura Esperanta Asocio** estas enkadrigata en la Katedro "Jovellanos" pri Universitata Disvastigo, kiam, en monato junio de 2007, post la finiĝo de ĉiuj kursoj en la Domo de la Katedro, oni efektivigis la translokigon, ĉiuj dependaĵoj, ankaŭ nia Esperanto-Grupo, estis translokigita al nova konstruaĵo, en la numero 1 de la strato Tomás y Valiente. En tiu nova loko oni disponigis al ni bone situitan ejon, multe pli ampleksa ol la antaŭa kaj tre taŭga por niaj laboroj de Esperanto-instruado, kunsidoj…

La informo pri ĉiuj ĉi aferoj, kompreneble, estas registrata en la numeroj de **HELECO** de tiuj jaroj, sed ekde majo de la jaro 2006 nia E-grupo havas alian informilon. Ĝia titolo estas, precize, ***AEA-Informilo***. Tiu publikigaĵo, el kiu ĝis nun aperis 5 numeroj, estas destinita nur al la membroj de la Asocio, kaj ĝia enhavo posedas nur esperantistan intereson. La kolekto de **AEA-Informilo** troviĝas, ankaŭ ĝi en la retpaĝo de nia E-Asocio.

En la E-kurso de la lerno-jaro 2007-2008 Santiago Mulas, povis, post la resaniĝo el la sekvoj de la akcidento kiun li suferis la antaŭan jaron, reintegriĝi al la instruado. Estis instruado de baza kurso, sed tial ke estis gelernantoj de antaŭaj jaroj, kun pli da sperto, kaj novaj lernantoj, estis necese fari duan kurson, ankaŭ bazan, kiun gvidis Carlos E. Carleos. La klasoj de tiuj kursoj okazis jam en la nova loko de la Katedro.

En septembro de 2007 estis eldonita la 82a numero de **HELECO**. Kiu estas videbla, same kiel la antaŭaj, en la Interreta paĝo de nia E-Asocio. La temaro estis tre diversa, sed inter la abunda materialo rimarkindas serion da artiloj kaj prelego-tekstoj pri la problemoj de la paco kaj la milito.




**Zamenhofa Tago de la jaro 2006 en Candás**